# La Pacdefendanto

Nr-o 9. NEREGULA INFORMA CIRKULERG POR ĈEĤOSLOVAKIO Sept. 1952

KAMARADOJ STREĈU VIAN FORTON!

Amiko pruntedonis al mi vian organon "La Pacdefendanto”n, kiun mi kun intereso tralegis. Mi ne okupiĝas pri politiko – kaj tamen mia simpatio apartenas nur al la laboristoj. Mi admiras la ĉeĥoslovakan popolon, kiu ĉiam staris ĉe la antaŭgvardio de la batalo por la libereco.

Laste vekis mian atenton via ĉef-artikolo, "ONI SERĈAS KOMUNAN LINGVON" – Estas ja paradoksa ekscii, ke iu intencas uzi nian lingvon por militaj celoj, sed se bedaŭrinde tio iam okazos, mi estas konvinkita, ke tiu flanka armilo poste devojiĝos de la al si de la Pentagonanoj planita celo kaj male kontribuos al popolunuiĝo kontraŭ la militinstigantoj. – Esperanto estas ja ĉies propraĵo kaj mi miras, ke la gvidantoj de la laboristaro ne pli objektive taksas ĝiajn avantaĝojn. Se en Francio Esperanto pli rapide disvastiĝas en rondoj burĝaj ol en laboristaj ne kulpas la lingvo mem, sed la laboristaj respondeculoj, kiuj konsideras ĝin kiel flankan amuzilon kaj aferon etburĝan.

Siatempe franca reakciulo Léon Berard malsukcesigis proponon por enkonduki Esperanton ĉe la Societo de Nacioj en Ĝenevo, deklarinte ke ĝi estas danĝera marksista internacia interkomprenilo. – Kiam oni volas droni sian hundon, oni deklaras ĝin rabia. – La homoj ĝenerale (escepte la esp-istoj kaj kelkaj progresemuloj) ne montriĝis ankoraŭ sufiĉe maturaj por akcepti nian lingvon kaj konsideras ĝin utopion. Laŭ la historia procezo, ĉio nova, krom tio, kio koncernas fratmortigadon, ĉiam baraktas kontraŭ ĉiuspecaj mokoj kaj baroj. Eĉ en la menso de la ekspluatatoj ofte regas insiste naciecaj antaŭjuĝoj kaj ŝovinismo.

Pri tio mi spertis, parolinte kun francaj laboristoj ĵus demobilizitaj post 18 monata milit-servo en la okcidentgermana okupzono. Ili rakontis pri strikoj, okazintaj en tiu regiono, kaj fanfaronis, ke ili invadis la uzinojn per tankoj kaj perforte devigis la laboristojn vole ne vole rekomenci la laboron.

Francio ja suferis dum 4 jaroj de german-nacista okupado, sed ĉu pro tio kulpigi ĉiujn Germanojn? Ĉu en la germanaj ekstermejoj ne ankaŭ mortis amase germanaj demokratoj kaj pacamantoj?

Ĝojante, ke ili malsukcesigis la strikojn kaj depostulojn de la germanaj laboristoj, tiuj Francoj ne konscias, ke ili subpremis siajn samsortanojn, siajn klasfratojn.

En 1918 Versajla Kontrakto strangigis la germanan ekonomion sekve de kio okazis senlaboreco kaj mizero – Hitler tiam profitis kaj vekis venĝemon en la popolamasoj. La soldatojn li varbis inter la multnombraj senlaboruloj. Pri tio respondecas ĉefe la internacia kapitalismo, kiu preparis al li favoran grundon. Estus dezirinde, ke la laboruloj ekkonsciu pri la neceso, lerni Esperanton, dank' ak kio ili povus rekte interrilati kun la alinaciaj samklasanoj spite de iu ajn artefaritaj baroj. – Tio ja plejtrafe stimulus la senton de internacia solidareco.

"Lernado de Esperanto fariĝos kosmopolitismo de paco kaj tutmonda socialismo" – Pri tio mi tute konsentas –

Vi, esperantistoj de popoldemokr. respublikoj, streĉu viajn fortojn kaj klopodu konvink[i] viajn gvidantoj pri la neceso instrui Esperanton en viaj lernejoj, sindikatoj kaj pacorpanizoj!

Lucien Bovgois
NOYELLES-GODAULT-FRANCIO

## P A C K O N G R E S O  D E  A Z I A J  K A J  P A C I F I K A J  L A N D O J

En la lasta semajno de septembro 1952 okazos en Peking la porpaca kongreso de aziaj kaj pacifikaj regionoj. Partoprenos reprezentantoj de 1.600 nilionoj da homoj, al kiuj minacas nova pli kruela milito kaj ĝenas la nun jam grandaj militpreparoj.

Laŭ k-do. Stalin la paco ne estas dividebla. Paco en Azio garantias pacon en Eŭropo kaj Tutmondo. Certe ankaŭ partoprenos delegitoj el eŭropaj kaj aliaj regionoj, sed altsignifa kaj multvalora estus alveno de aro da salutleteroj kaj kuraĝigoj el ĉiuj eŭropaj kaj aliaj landoj.

La ĉeĥoslovakaj gek-doj zorgu pri tio, ke ĉiu pli granda uzino, ĉiu pacdefenda komitato, organizoj de junularo, sindikatoj kaj partioj sendu sian leteron. Krom tio estus valora, se aparte prominentuloj, verkistoj, kuracistoj, profesoroj, urbestroj kaj aliaj, esprimus sian solidarecon al tiu ĉi grava porpaca kongreso.

La nacilingvaj leteroj kun aldona Esp. traduko estu ekspedataj aer-poŝte al Ĉina Esperanto Ligo, P.O. Kesto 77, PEKING, Ĉinio, kiu faras la peranton. Ordinaraj leteroj jam ne atingos sian celon ĝustatempe.

Ne forgesu ankaŭ sendi salutleterojn okaze de la 3. datreveno de l' fondiĝo de la Ĉina popola respubliko, kiu okasos la l. de oktobro!

## La 25 S.A.T. KONGRESO

okazis nunjare en Düsseldorf, okc. Germanio inter la x - 8 de aŭgusto. Malgraŭ la ne favoraj vojaĝeblecoj partoprenis centoj da gek-doj. Krom alia interesa programo estis diskuto laŭ iniciativo de k-do. V i t o pri la problemo "Kiel reagi kontraŭ la militfaktoroj". Nia redakcio bedaŭrinde ankoraŭ ne ricevis detalan raporton, ĉar el Ĉeĥoslovakio, laŭ nia scio, neniu havis okazon partopreni.

## PROLETA INTERNACIISMO

K-do. Dmitar Ionkov Mihov, kiu kuŝas jam de 1950 grave malsana en la hospitalo "Parahod" de Gabrovo, Bulgario, anoncis al la Esperanto-rondeto en Plzeň, Ĉeĥosl. ke lian vivon povas savi sole akiro de tabledoj "PAS" kaj Penicilino, kiuj en Bulgario ne estas al dispono.

Post interkonsilo en la rondeto, konsciinte, ke la necesaj medikamentoj estas produktataj en Ĉeĥoslovakio, k-do. Burda petis de la ministerio por saneco aĉet- k. eksport-permeson, kiujn li nur post nur malmultaj tagoj de ĝi ricevis.

Tuj estis aranĝita monkolekto inter la esperantistoj eĉ neesperantistoj por povi aĉeti la necesajn multekostajn medikamentojn por la al ni nekonata, sed tamen esperantista kamarado en Bulgario. Ankoraŭ la saman tagon estis la valoraj medikamentoj zorgeme enpakitaj kaj per aviadilo ili jam atingis nian bulgaran kamaradon.

Ni ĉiuj deziras al li rapidan resaniĝon!

## R A D I O – L I L L E

disaŭdigas ĉiumarde Esperanto-kronikon de 8,35 horo je ondo de longeco 235 m. Tiu ĉi disaŭdigo jam instigis 183 geaŭskultantojn en Francio peti detalan informon pri Esperanto.

## L E T E R O  a l  k - a d o  S T A L I N

Sub tiu ĉi titolo aperis longa artikolo en la franca gaz. "Le Monde" la 26.2.52. Traduko de tiu ĉi let. estis en "Sennaciulo" kaj en "Esperanto" (UEA) en la juniaj n-oj. La subskribinto estas André Piere. Bedaŭrinde tiuj gazetoj ne atingis nian redakcion por ĉerpi detalan informon. Laŭ privataj informoj estis tiu letero tre malfeliĉe stiligita kaj eble pli malhelpos al nia afero.

Al la KONFERENCO DE PACPEFENDANTOJ DE LA AZIAJ KAJ PACIFIKAJ LANDOJ
e n   P e k i n g

La subskribitaj organizoj, uzinoj, kluboj kaj unuopuloj plejkore salutas Vian packonferencon kaj ĝojas pri tioke vi en landoj de ni tiom malproksimaj kunvenis, por per komuna decido malebligi al la militinstigantoj ekflamigi novan mondmiliton, kaj fari ĉion, kio estas en Via forto, por finigi la teruran ne homindan militon en K o r e i o . La paco estas ne dividebla kaj Via batalo por defendi lapacon en Azio kaj la Pacifikaj Landoj estas samtempe bato kontraŭ la militinstigantoj en la tuta mondo.

Ni ĉi tie, malgraŭ tio, ke ni estas de vi malproksime, iras ŝultro ĉe ŝultro kun vi en la tutmonda batalo por konservi la pacon.

Ni deziras al via laboro multan sukceson! Vivu la tutmonda paco!
For la militinstigantoj!

Esperanto-rondeto
de urba kleriga klubo
en Plzeň, Ĉeĥoslovakio

Ĉeĥosl. konunista
partio
regiona konitato en Plzeň

Ligo de ĉeĥoslovaka
sovetia amikeco –
regiona sekretarejo
en PLZEŇ

Ligo de transportlaboristoj
Entreprena konsilantaro
Plzeň

Entreprena konsilantaro
de distrikta nacia malsanula
asekurejo en P l z e ň

Entreprena konsilantaro
de la poŝtoficejo PLZEŇ

Entreprena org.
de la kom. partio
en la urbdomo
Plzeň

R U D É   P R Á V O
regiona redakcio en
Plzeň

Higiena instituto
de kuracista fakultato
de Karlova Universitato
en Plzeň

Ligo de laboristoj en
metalindustrio
Entreprena konsilant.
de uzinoj de V.I.Lenin.
P L Z E Ň

Uzinoj de V.I.Lenin
nacia entrepreno
direkt. Brabec
PLZEŇ

Revolucia sindikata
konsilantaro-Plzeň.

Vojaĝa Informa Servo
P L Z E Ň

Ĉeĥosl. ligo de junularo
tutuzina komitato
Uzinoj de V. I. Lenin, Plzeň

EL POPOLA ĈINIO
peranto por ĈSR.

Entreprena organizo
de kom. partio ĉe Nacia
komitata
fako por instruado, klerigo
kaj gimnastiko en Plzeň

Ligo de kontraŭfaŝismaj
batalintoj
departementa komitato
en Plzeň.

Ĉeĥoslovaka ligo
de junularo
de regiono Plzeň

Entreprena konsilantaro
de la revol. sindikata
movado en la bierfabrikejoj
de P l z e ň

Entreprena konsilantaro
de la sindikato
de granda kaj malgranda
Teatro en Plzeň

Entreprena organizo
de kom. partio ĉeĥoslovaka
ĉe la teknikaj oficejoj
de urbo Plzeň

Ligo de ĉeĥosl. artistoj
regiona centro en Plzeň

Sindikata organizo de
fervojistoj
en Plzeň.

Al tiu ĉi salutletero aliĝis ankoraŭ ĉiuj grupoj de partiaj kaj sindikataj organizoj, diversaj kluboj etaj fabrikejoj, entreprenoj kaj miloj da unuopuloj per siaj subskriboj kaj ŝtampoj. Pro manko da loko ni nur povas publiki la plejĉefajn. En dika letero estis jan aerpoŝte la salutleteroj senditaj al la Ĉina Esperanto Ligo en Peking, kiu ilin transdonos al la packonferenco.

## KIU KURAĜUS IMITI

Malnova esperantisto k-do Láďa Proskovec transdonis al nia redakcio eltranĉaĵon aperintan la 7. de februaro 1941 dum germana-faŝista okupo de Ĉeĥoslov**a**kio en la ĵurnalo de ĉeĥaj naciaj demokratoj "Český Deník". Tio estis en tempo, kiam la germanaj nacistoj jam regis du jarojn en nia lando. Jen ni publikas la artikolon:

"TIO JAM POVUS MALAPERI"!

En Doubravka, strato de Masaryk.

Sur la laborista domo troviĝas

kesto de esp-istoj, granda 60x70 cm, en kiu estas subskribo akre formulita kontraŭ la "Internacia faŝismo" kiel la II. kaj III. Internacionalo kutimis nomi ĉion, kio al ili ne konvenas. Ni opinias, ke tiu ĉi kadrumita blufo povus esti jan de longe malaperinta".

Laŭ raporto de k-do Proskovec tenis pri afiŝo kontraŭ la puĉo de Franco en Hispanio, sur kiu aviadiloj bombardas virinojn kaj infanojn, kun la surskribo: La faŝisno agas ĉie same! Tiu ĉi afiŝoj, kiun al mi sendis tian hispanaj k-doj, pendis preskaŭ 2 jarojn en la forlasita eksposicia vitrokesto de la iama Esperanto-grupo en Doubravka. Ĝis post la apero de la supre menciita artikolo en "Český Deník" estis la k-do devigita ĝin forigi, ne volinte interkonatiĝi kun germana koncentrejo. -Tiutempe la ĵurnalo de Ĉeĥaj faŝistoj nomis nian movadon "kadrumita blufo" – hodiaŭ aliaj diras "kosmopolitika lingvo kaj lingvo burĝa". Ĉu ĉiuj volus kuraĝi tiamajn faŝistojn?

## KONGRESO DE NACIOJ
### por defendi mondpaoon

Dum aŭtuno kunvokas la Tutmonda packonsilantaro al Aŭstrio-Wien kongreson de nacioj por defendi la mondpacon. Jam en kelkaj landoj fondiĝis esp-istaj packomitatoj, kiuj fervore kaj entuziasne propagandas kontraŭ la militinstigantoj. Certe dum tia grava kongreso ankaŭ la esp-istoj estos reprezentotaj per siaj delegitoj kaj ankaŭ la ĉeĥoslovakaj k-doj devas klopodi elsendi almenaŭ el ĉiu pli granda urbo po unu delegiton.

## ĈU INSTRUI ESPERANTON AL INFANOJ?

En la bulteno de la aŭstralia esperantista asocio "LA RONDO" n-o 50 ni legas inter aliaj interesaj raportoj pri la aŭstralia Esperanto movado sciigon, ke la instruado inter la infanoj bone progresas. F-ino Kerlson gvidas kurson en klaso de registara lernejo por 10 jaraj knabinoj en urbo Adelaide. Ĉe la Woodlands knabina lernej**o** funkcias infanklubo kun **11** knabinoj. La Esperanto societo en Adelaide okazigis dum sia maja kunveno diskuton kun la temo: "Ĉu estas pli bone instrui infanojn ol plenaĝulojn?" Kaj publikas demandon: kion opinias pri tio niaj fratkluboj?

Ni do opinias, ke estas plejbone instrui ambaŭ ajn, sed tamen ni konsciu, ke la infanoj signifas nian estonton. Kion vi sukcesas semi en la cerbon de infano, tion ĝi portos dum sia tuta vivo kun si kaj nur tre malofte iu sukcesas ekstermi el ĝia cerbo la alprenitan ideon. Esperantistoj de infanaĝo ordinare estas la plej persistaj idealistoj. Nia movado tiajn idealistojn bezonas. Pro tio ni eduku, kiel eble plej multajn!

En Ĉeĥoslovakio jam en nultaj urboj niaj gek-doj ekkomencis instrui Esp-on **al** infanoj kaj la rezultoj estas bonaj. Infanojn tre interesas akiri kontakton kun infanoj eksterlandaj. Ili ŝatas ricevi belajn p.k. kaj p.m. el ĉiuj landoj, ili ŝatas korespondadi kaj reciproke interŝangi siajn fotojn kaj lernejajn desegnaĵojn. Pri la ricevita materialo ili ege fieras kaj taksas sin multe pli konsciaj ol la samaĝul**o**j, ne havantaj tiajn internaciajn rilatojn. Ili montras tiun materialon al aliaj infanoj, al siaj instruistoj, gepatroj kaj konatuloj kaj tiel maniere ili vole nevole propagandas nian lingvon, nian ideon. Ili scias propagandi pli bone ol plenaĝuloj. Ili ankaŭ pli facile sukcesas. Ni estu al ili hepemaj en aranĝo de internacia kontakto k. letertraduko.

VETKONKURO POR "EL POPOLA ĈINIO"

"E.P.Ĉ.", la solan kaj perfektan Esp. gazeton kaj plej efikan propagandilon de nia lingvo necesas en nia lando multe pli disvastigi. Ni ĝis nun distribuas nur kelkcentojn kaj nia losungo estu: distribui kelkmilojn! Ĉiu esperantisto fariĝu abonanto de EL POPOLLA Ĉinio kaj LA PACDEFENDANTO. Ambaŭ gazetoj estas sampoŝte ekspedataj kaj kostas por tuta jaro nur 92 Kčs. Ni liveros ek de aprilo ĝis aprilo 53.

Iru de dono al dono, de esperantisto al esperantisto kaj varbu senĉese!

La l. plejmulte varbonto ricevos kiel rekonpencon belan pupon vestitan en ĉeĥosl. nacia kostumo, granda **50** cn. La 2. ple multe varbonto ricevos silkan poŝtuketon **30**x**30** cm kun bildo de Hradčany kaj esperanta surskribo, manlaboro de konata pentristo Wenig el Plzeň. La 3. plej multe varbonto ricevos Esp. libron el Japahio kaj 7 ceteraj po unu broŝuro "La plejforta voĉo de la paco", el Ĉinio.

Valoraj estos nur tiuj abonoj, kiujn akompanas samtenpe la jarabon-pago 92,- Kčs. Pri la ĝusta distribuo de la rekompencoj respondecos la komitato de la Esp.-rondeto en Plzeň. La varbitajn jarabonojn kun preciza adreso kaj nomo sendu rekte al la peranto, k-do Burda Rudolf, Palackého nám. ĉ 6, Plzeň.

Kun tiu ĉi n-o ni sendas al vi kelkajn malnovajn ekz-ojn de EPĈ senpage, por plifaciligi vian varbadon.

STENOGRAFIA KONKURSO

Kiu scias la ĉsl. stenografian sistemon "Herout-Mikulík", stenografu ĉeĥlingve jenan frazon:

"Sp/olu/práce /nár/odů v/e/dnech honby /v/š/e/m lidem ot/e/vřena je naŝí ř/eči/."

La literojn inter krampoj ellasu, ĉar tiel aŭ estas ordinare en stenografio, aŭ la koncernaj vortoj estas sigloj. Se vi skribis ĝuste, la stenografitaj vortoj aspektas kvazaŭ normalaj latinaj literoj, kiuj formas nomon de nia lingvo. Solvon sendu al k-do-Stanura Ad. Táborská 42, Ostrava-Radvanice. Li rekompencos per ŝlosilo al Esp.-stenografio laŭ Herout-Mikulík.

ANTAŨEN KAMARADOJ!

De Alois Kubala – Ostrava-Záb.

Nur antaŭen kamaradoj
antaŭen ni iru
"Esperanto min a tendas"
ĉiu al si diru!
Tempo pasas en eternon
paco ekvekiĝas.
Nova sfero da laboro
prudente leviĝas.
Vigla vivo de mateno
sur la stratoj bruas.
Riveroj da brigadistoj
al laboro fluas.
Pelas ilin sento nobla
helpi al bezono.
Vokas ilin respubliko
del' koro sentsono,
karbo, fero, terkulturo,
vitro, tekstilfako
laŭ la plano produktataj
forte brak' en brako.
Per ĉi tiu brilmetodo
Esperanto gvidu
ĉiu vera kamarado.
Majstron ne perfidu!
Registaro observas nin,
observas movadon.
Ĉu vi volas entombigi
en vi la penadon?
La movado volas vidi
maron da verduloj
Esperanton bonuzantaj.
Ne fermu l' okulojn!
Planoj celas nun epokon
elnaskas bonvervon.
Planu karaj kamaradoj,
dediĉu la cerbon!
Por ideo tuthomara
per paca metodo
Vojon al vi fakte montras
sukceso kaj odo.
Persistu en cirkonstancoj
nune ne konvenaj
Subvenas vin kunhelpantoj
viglaj, esperplenaj.
Nur antaŭen kamaradoj,
ne restu vi surdaj!
Al la paco per Esperant'
Burda gvidas multajn.

Ne volonte ni publikas ĉi poemon kaj precipe mi ne publikas aron da simpati-leteroj, kiuj amase atingas nian redakcion el en- kaj eksterlando. Sed tamen tiuj leteroj kaj jena poemo ja esprimas sian simpation kaj solidarecon ne nur al mi, sed al ĉiuj kunlaborantoj kaj nia tuta movado. Burda.

# Korespondi deziras

K-do. Miloš Lukáš, Bezručova ul. 853 HRADEC KRÁLOVÉ, ĈEĤOSLOVAKIO, bezonas ricevi la l. n-on de la jarkolekto 1950 de EL POPOLA ĈINIO. Li afable rekonpencos la donacinton.

K-do Karel Herčí, Marxova ĉ.31. MLADÁ BOLESLAV, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj. Certe resp.

K-ino Věra Wenischová (27 jaea), Marxova ul. č. 24. Plzeň, Ĉeĥoslov. interŝanĝas il. p.k. kun ĉiuj land.

K-do. Stefen Slavov Radev (komenc.)

Str. Stefan Karaga **38**, NOVA ZAGORA, Bulgario, interŝ.il. p.k, p.m. ĵurnalojn kaj afiŝojn kun ĉiuj land.

K-do. Josuphe Mustafov Jonerov, Str Kiril kaj Metodi 19, NOVA Z4GORA, Bulgario (komencanto) interŝanĝas il, p.k., p.m. ĵurnalojn kaj afiŝojn kun ĉiuj landoj.

K-do Bartoň Miroslav, Benzinol, Slavíčkova 517, LIBEREC III, Ĉeĥosl. Per il p.k. kun ĉiuj landoj.

K-do Mxxl František, VRKOSLAVICE č. 204, okr . /Jablonec nad Nisou, Ĉeĥoslovakio, koresp. kun ĉiuj landoj kaj interŝ. il, p.k.

K-do Zbirosz Eugieniusz, U1. Peikarska 27, MSZCONOW, Polio, deziras koresp. kun ĉiuj landoj per il. p.k. (lernanto)

K-do Syrahowsky St., il. Mariacky 4/4, KEAKOW, Polio, 21jara studento komencanto, dez. kor. kun ĉ. landoj

K-do Aleksander Pop Arnaudov, Ul.„Nikifor Pop Konstantinov 30, PAZARĜIK, Bulgario

K-do Petro P.Arnaudov, Ul. Nikifor Pop Konstantinov, N.30, PAZARĜIK, Bulgario.

K-do Danuan Rangelov Dinkov, Selo Dubrovnica, PAZARĜISKO, Bulgario.

K-do Diniter Fotev P. Janev, Ul. G. Dimitrov N. 35, PAZARĜIK, Bulgar.

K-do. Fikolaj Boris Stoilkov, Ul. Nikifor P. Konstantinov N. 32, PAZARĜIK, Bulgar.

K-do Stepan Stepanjan, Ul. Dubrovnicka N. 3, . PAZARĜIK, Bulgario

K-do. Todor Ŝabanov, Ul. C. Penev 8. PAZARĜIK, Bulgario.

K-do. Stojan D. Demiranov Ul.41, Stamboliski N. 64, PAZARĜIK, Bulgario

K-dino. Kristina G. Manĉeva, Ulica Petro Maŝev, N. 3, PAZARĜIK, Bulgario

K-dino Angelinka St. Ivanova, Ul Benkovski N 31, PAZARĜIK, Bulgario

Knabino 8jara, Yuko H i r o t a, Fujini-tyo 2-4, Tiyoda-ku, TOKIO, Japanio, interŝ. lernejdesegnaĵojn kun infanoj ĉiulandaj.

K-dino Kurihara Tunsko, Adatikata Gcryo jinzya-nal, Karasuma, Kanikvo-ku, Kyoto, Japanio, kun infanoj per il. p¨.k.

Komencntino, Berot Andersson, Odalvagen 16, H a s s e l b y Vistad, Svedio, estas 16 jara ino. interesas pri sporto, filmoj kaj libroj.

Niaj gekamaradoj nun multnombre koncentriĝas en la Rondoj de amikoj de Oriento (kruh přátel Orientu) kiuj ekzistas ĉe la uzinaj kluboj de ROH kaj Osv. Bes. Kie tiaj rondoj ankoraŭ ne ekzistas niaj k-doj povas ĝin fondi. Tiel maniere ili jam de nun certigas al si daŭran interkontakton kun niaj k-doj. el la Oriento, kiu estas vere tre interesa - Aranĝu multnombran interkorespondadon!

---

Eldonas: OSVĚTOVÁ BESEDA – KROUŽEK ESPERANTISTU v PLZNI
Redakcio: K-do. Rudolf BURDA, Palackého nám. č. 6, PLZEŇ
ĈEĤOSLOVAKIO